1995
1937
58

1995
23
~~72~~

C. Raad
Brusselse str. 63
3000 Leuven

In naam van E 2000 melden wij U het overlijden van de Heer Ghislain Jacobs, op de ouderdom van 72 jaar, (30-12 23.) bestuurslid van Esperanto 2000 en ex-lid van de Culturele Raad. Er ~~zal~~ geen dienst worden gehouden niet kerkelijk niet burgerlijk. Zijn lichaam heeft hij geschonken aan de Wetenschap namelijk de V.U. Brussel.
Zijn adres ~~is~~: Kerkstraat 97
~~Zou~~ 3010 Kessel-Lo
Indien U dit ~~zal~~ zou willen aanwenden voor deelnemingsbetuiging aan zijn echtgenote.
Met de meest hoogachting

Ghislain Jacobs — A.L. Syndroom

V.U.Bxl. lichaam afgestaan ± 2 jaar
Geen dienst
72 jaar — 73

30 Dec 23
16 jaar gehuwd. Gestorven 19 uur

Wim De Smet
Paula X / Marc X
X Felix Neeft
X Jeuris
Tel vanaf
19 30
FEL —
X Fr. Groen
21
X Bert Boon
SAT
Belgie
De Sutter — 059/501825
Hesquinez zie Fel
BEFA
X Martin De Caluwe
Kathia Lodewijk
X Hollants
FERNANDEZ
Herolelo
X Rael Verhaag
UEA
X Bert Vanhoven
X Julia Maes — E 2000 opsturen
X Myriam — X

# *N E K R O L O G E*

## *GHISLAIN JACOBS ( 1923 - 1996 )*

Post aktiva vivo dediĉita al Esperanto kaj al la batalo por pli bona mondo forpasis nia amiko kaj honora prezidanto Ghislain la 2an de februaro 1996. Por ni ĉiuj li ĉiam estu ekzemplo!



A.MARMENOUT
Helmweg 7
8300 Knokke

Knokke Dato : 10-an de aprilo 1996.

Al laEstraro de Esperanto2000
p/a R.Goris
Rue Ménada 44
1320 Hamme-Mille

Karaj Geamikoj,

Kun tro granda prokrasto,pro foresto en eksterlando mi nur nun kortuŝita ekscias pri la forpaso de la karmemora Ghislain JACOBS fakte iniciatinto kaj kunfondinto de Esperanto 2000.

Lastfoje mi renkontis lin en Hamar,Norvegio en 1990 dum IFEF-kongreso kaj rememoris lin kiel la bonhumora, ridema viro kun la vigla menso kiu elradiis sian entuziasmon al sia ĉirkaùaĵo.

Tiaj homoj restas vivantaj en la koroj de tiuj kiuj havis la feliĉon koni ilin.

Al la grupo "ESPERANTO 2000" de Loveno mi prezentas mian sinceran kondolencon sed ankaù ĝin gratulas pro la kortuŝa omaĝo al Ghislain Jacobs.

Amike via

A.Marmenout

" La popoloj faros en konsento - Unu grandan rondon familian. "

Mijn oprechte dank voor de hulp geboden aan Ghislain
Van Paula. Ghislain
Jacobs Vankelmond

## Papilio

Flugas papilio tra la aero. Multkolora papilio kontrastas al la helblua ĉielo. Ĝi flirtas kun la floroj kiuj delikate beligas la branĉetojn de la ĝardenaj plantoj. Flava floro sentas ruĝecan papilion kun ĝiaj profunde bluaj makuloj. La flugiletoj movigas la aeron ĉirkaŭ la floro, kiu tial ekmovas. Flava flamo fulmas sub la flugiloj, flava flamo kun nigra koreto en la mezo. Ĝi estas inaŭguranto de junio. La printempa aero jam pensigas pri varmaj someraj vesperoj. Jam nun la aero varmas iome, la vintro estas forpelita, papilio varmigas la korojn.
De floro ĝi flugas al floro, de flavo al flavo portas ĝin ĝiaj delikataj flugiloj. La makuloj sur tiuj bluas preskaŭ nigre, kvazaŭ postrestaĵoj de nigra periodo. La kerno de la nigre-bluaj makuloj pli helas, ĝis preskaŭ blanko. Kvazaŭ la naturo per tio volis esprimi ke en ĉiu nigro ĉiam troviĝas hela feliĉo. Ĉirkaŭ la makuloj flava rando similas la florojn kiuj flirtas en la papilia venteto.
Rigardu: la floroj ŝajne flirtas inter si. Floro floron tuŝas kaj koro koron. La ĝardeno ŝajnas feliĉa sub la suno.
La sunradioj reflektiĝas kontraŭ la papilio, tiel ĵetante nigran ombron sur la flavo de la floro. Tiu nur momenton denove memoras la vintran malhelon, sed jam la papilio pasis kaj en la venteto la flavo de la floro denove entuziasme ekbrilas. La floro amas la sunon, ĝi amas ties radiojn, ĝi amas ties varmon kaj kareson.
Kaj la suno ridas. Ĝi scias ke baldaŭ la somero denove regos la landon, la vilaĝon, la ĝardenon, la floron. Ĝi scias ke baldaŭ la ĝardeno montros sian belecon al promenantaj homoj. Kaj ĝi ankaŭ scias ke ĝi, la suno, estas la origino al tiu vivo kaj beleco. La suno feliĉas pro tio kaj pli profunden provas radii tra la aeron en la floron.
La papilio ne sentas tion. Ĝi estas nur fluganta objekto kun belo sed sen homa koro. Baldaŭ ĝi naskos papililidojn. Mem ĝi mortos. La idoj papiliiĝos. Kaj ĉio rekomenciĝos.

Ĝiseterne.

* teksto pli frue aperinta en "Esperanto 2000", nun reaperas honore al Ghislain, nia homa papilio.

# Esperanto 2000

speciala numero

Tweemaandelijks tijdschrift — Dumonata revuo
februaro 1996 — jr. 17, nr. 1 bis — februaro 1996

V.U. Roger Goris, Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille: 2

**ESPERANTO 2000**
revuo de Esperanto 2000 vzw, asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadresoj** / *Kontaktadressen*
- Frans Croon, Laarstraat 56, 1910 Nederokkerzeel (prez.)
- Roger Goris, Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille, 010/86.01.12 (sekr.)

**Membreco** / *Lidmaatschap* **E2000**
- membro/*lid* Eo2000 + FEL = 600 fr = Eo2000, Horizontaal, Jongeren Eo Nieuws (- 30-jara)

**Membreco** / *Lidmaatschap* **UEA** :
- membro/*lid* UEA = 290 fr
- same/*idem* + jarlibro = 720 fr
- same/*idem* + Esperanto = 1800 fr

**Abonoj** / *Abonnementen* (1996)
- Esperanto 2000 = 300 fr (*Nl*/Eo)
- *Horizon-taal = 600 fr*
- Vertikale= 200 fr, por aktivuloj
- *Jongeren Esp.o Nieuws = 400 fr*
- Juna Amiko = 320 fr, por infanoj kaj komencantoj
- Esperanto (UEA) = 1145 fr
- Kontakto = 765 fr, por komencantoj
- Heroldo de Esp.o = 990 fr (gazeto)
- Monato = 1390 fr, por ĉiuj
- Agenda "La Jaro" = 180 fr
- Eventoj = 1370 fr
- El Popola Ĉinio = 950 fr

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn kategoriojn / *Gelieve bij betaling duidelijk de gewenste kategorieën aan te geven.*
Konto/*rekening* : 734-3331944-03 de/*van* "Esperanto 2000, 3000 Leuven"

**Reklamo** / *Reklame*
1 p.= 300 fr 1/2 p. = 180 fr
1/4 p.= 120 fr 1/8 p. = 80 fr
Jarabono = 5-oblo por 6 n-roj
*Jaarabonnement = 5-maal voor 6 nrs.*

Pri la tekstoj nur la sendintoj respondecas / *Voor de teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk*

## De la redakcio

Mallonga sciigo aŭdiĝis telefone: mortis Ghislain Jacobs.

Ni ja ĉiuj scias: en la lastaj jaroj li grave malsaniĝis.
Lia menso restis vigla kaj ĉionscia ĝis la lasta tago, sed la korpo ne volis elteni.

Malrapide ĝi malfortiĝis kaj lasis lin sola kun la multegaj ideoj kaj iniciatoj kiuj ankoraŭ trafulmis lian cerbon. Ĝis la lasta tago.

Ghislain estis ĉefa kunfondinto de Esperanto 2000.
Li faris la unuan paŝon por komenci kurson, komence de 1978. El tiu embria kurso originis la unua vera vesperkurso en Leuven (34 partoprenintoj!).
Kelkaj kursanoj kaj Ghislain kune fondis la novan asocion Esperanto 2000.

Nia asocio do multon ŝuldas al Ghislain. Ne nur ĝian ekziston mem, sed ankaŭ la kritikajn instigojn al agado, la kuraĝigon, la entuziasmon.

Ghislain, ni ne forgesos vin.

La estraro kaj kunlaborantoj.

■



**Post obstina batalo kontraŭ kadukiĝo forpasis Ghislain Victor Jacobs.**
**Li naskiĝis la 30an de decembro 1923 kaj mortis klinike la 2an de februaro 1996.**

**La mortinto disponigis sian senvivan restaĵon al scienca esplorado kaj, konsekvence, la kremacio kaj la cindrodisŝutado okazos en intimeco je poste fiksota dato. Nek floroj, nek kronoj.**

**Geamikoj kaj gekonatuloj estas petataj konsideri ĉi tiun anoncon kiel sciigon.**

**Paula Vanhelmond tion komunikas, lia edzino, kaj la familio, kiuj sincere dankas la multajn flegistinojn kaj aliajn gehelpantojn pro la prizorgado kaj vartado de la forpasinto.**

**Koresponda adreso:**
**Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo**